Juni 1913 4e Jaargang No 6 (42)

# Nederlanda Katoliko

**Maanblad, Officieel Orgaan van den Nederl. R.-Kath. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko", gevestigd te 's Hertogenbosch, opgericht 29 Augustus 1909, bisschoppelijk en koninklijk goedgekeurd.**

Ĉion per amo, nenion per forto. (*S. Franc. de Sales*).


## EERSTE ROOMSCH KATHOLIEKE
## Levensverzekering-Maatschappij
## te NIJMEGEN, van Oldenbarnevelstraat 75.

**Telegram-adres ERK**

Met Kerkel. goedk. van doel en Koninkl. goedk. der Statuten.

| | |
|---|---|
| Aantal Polissen op heden . . . . . | 13,500.— |
| Verzekerd bedrag pl.m. twee en een half millioen | f 2.500.000.— |
| Jaarlijksche Premie pl.m. . . . . | 85.000.— |
| Het aantal contracten ging in 1912 vooruit met | 5.866. |
| Het verzekerd Kapitaal „ „ „ | 1,150.000.— |
| De Jaarlijksche Premie „ „ „ „ | 39.000.— |
| Ontvangen aan premiën en koopsommen over 1912 . | 100.000.— |
| Bedrag aanwezig voor reserve pl.m. . . | 95.000.— |
| Het aantal polissen in Februari 1913 uitgereikt bedroeg ruim . . . . . | 900. |
| Met een verzekerd Kapitaal van pl.m. | 150.000.— |

NIJMEGEN, 1 Maart 1913.

De Directeuren:
H. J. BODENSTAFF.
C J. Th. SMITS.


# Een der Beste Leerboeken.

„Een der beste leerboeken over Esperanto, die wij ooit onder de oogen kregen". Aldus luidde de conclusie der „Nieuwe Haarlemsche Courant" over het leerboek in het Esperanto door Majoor J. P. L. NIESTEN.

De prijs van dit volledig leerboek met opgaven en uitwerkingen, bevattende 275 bladzijde is f 1.50.

# HAMMOND SKRIBMAŜINO LA PLEJ BONA!

## La Hammond-Kopiejo.

Sin okupas pri la kopiado de tagordoj, cirkuleroj, regularoj.

*Same de*

**Leteroj, Polisoj, Diktaĵoj,**
**Kontraktoj, Protokoloj, Vendejaj kaj borraj aciigoj k. t. p.**

Sekretigeco, rapida liverado, neta kaj akurata faraĵo garantiata.

*Sekretarioj de unuiĝoj, postulu nian specialan prezaron.*
*Diversaj referencoj estas disponeblaj.*

Amsterdamo. -:- Rokin 38.

TELEFONO 4443.

La „STELIOJ" - Cigaredoj estas fumataj en 'Hinujo, Japanujo, Afriko, Indio, k.t.p.
En Eŭropa la uzado ĉiam kreskas.
**PETEGU** en via loko la „Steliojn"
1 ĝis 4 c.)

Juni 1913. 4e Jaargang No. 6 (42)

# Nederlanda Katoliko

**Maandblad, Officieel Orgaan van den Nederl. R.-Kath. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko", gevestigd te 's Hertogenbosch, opgericht 29 Augustus 1909, bisschoppelijk en koninklijk goedgekeurd.**

Ĉion per amo, nenion per forto. *(S. Franc. de Sales).*

**Hoofdredacteur:**
J. N. J. Smulders, Arts te Udenhout.

**Abonnementsprijs,**
p.jaar, franco p. post, bij vooruitbetaling
Nederland (niet-leden). . . *f* 1.—
België . . Sm. 0,87 = - 1,06
Andere landen (aliaj landoj)
Sm. 1,04 = - 1,24
Afzonderlijke nummers 10 cent.

E S P E R A N T O

**Redactie en Administratie:**
H. Damen, St. Crispijnstr. 57, 's Bosch.

**Advertentieprijs,**
per regel 10 cts.
Bij geregelde plaatsing aanzienlijke korting.
Voor inlichtingen wende men zich tot de administratie.

# NAAR TILBURG.

Toen, nu ruim een jaar geleden, uit Veghel het initiatief genomen werd, tot organiseering van een gewestelijken Esperantodag, vond dit voorstel allerwegen een gunstig onthaal.

Doch wie kon toen vermoeden, welk een prachtig verloop deze eerste Esperanto-dag zou hebben! Een succes, zoo groot, dat na afloop al dadelijk werd besloten, dit jaar opnieuw zulk een propagandadag te organiseeren. En wederom was het van Veghel uit dat het denkbeeld kwam dezen 2en Esperantodag te doen plaats hebben bij gelegenheid der Internationale tentoonstelling in Tilburg. Doch dit denkbeeld kon alleen uitvoering vinden, wanneer van het tentoonstellingscomité zelve, de meest mogelijke medewerking zou worden toegezegd.

Welnu; het mag een verblijdend teeken heeten, bewijs ook van de vooruitstrevendheid dezer mannen, dat de leden van dit comité onmiddellijk werden bereid gevonden de gevraagde medewerking te verleenen.

En dus togen de Tilburgsche Katholieke Esperantisten met allen ernst aan het werk, tot voorbereiding van deze grootsche propagandabetooging, die daarnevens ook zal gelden als eene feestelijke bijeenkomst van zeer vele Esperantisten.

Welhaast acht ik het overbodig tot deze laatsten nog eene aansporing te richten, om toch niet te verzuimen tegenwoordig te zijn bij de groote wapenschouwing van Katholieke Esperantisten, die zoo spoedig reeds in Tilburg zal plaats vinden.

De groote deelname aan de laatste jaarvergadering van „Nederlanda Katoliko" bewijst volkomen, dat er in

onze zuidelijke provinciën zeer groote belangstelling bestaat voor de zaak van het Katholiek Esperantisme. Diezelfde jaarvergadering heeft ook aangetoond, dat een betrekkelijk niet gering aantal gesamideanoj uit de Boven-Moerdijksche Provinciën niet schroomt voor een reisje naar het Zuiden. Waar dit reeds het geval was bij onze jaarvergadering, hoeveel te meer reden hebben wij dan niet om een groot aantal deelnemers te verwachten in Tilburg op den 6 Juli. Immers het is niet slechts *onze* bijeenkomst die hen zal aantrekken, doch ook de tentoonstelling zelve, die in belangrijkheid bijna met eene wereldtentoonstelling kan wedijveren.

Welnu, als we dus verzekerd zijn van de aanwezigheid van een groot aantal Esperantisten, dan is het ook zaak, mede door dat groote aantal propaganda te maken.

En tot dat einde spore een ieder zijne vrienden en kennissen aan:

**Kiest voor uw Bezoek aan de Tentoonstelling te Tilburg den 6 Juli.**

H.D.

---

# PROGRAMMA

## voor den 2den Esperanto dag te houden bij gelegenheid der Internationale Tentoonstelling te Tilburg, op ZONDAG 6 JULI 1913.

10 uur. Plechtige H. Mis in de particuliere kapel der Eerw. Fraters, Gasthuisstraat, waaronder preek in Esperanto door den WelEerw. Heer L. J. L. Poell.

11½ uur. Openingsvergadering in de groote zaal der Kon. Liedertafel „Souvenir des Montagnards" Willem II straat.

1 uur. Gemeenschappelijke maaltijd in de welingerichte zaal „Maison Boes" Heuvel.

2½ uur. Gezamentlijk bezoek aan de Internationale Tentoonstelling met Bloemenstad.

6 uur. Groote Propaganda-vergadering in de luisterrijk versierde feestzaal der Tentoonstelling.

---

Na afloop der vergadering GROOT CONCERT door de Tentoonstellingscapelle, welwillend aangeboden door het comité der Tentoonstelling.

En daarna schitterend vuurwerk.

---

## Toelichtingen.

Zooals uit nevenstaand programma duidelijk blijkt is de commisste tot voorbereiding van den 2e Esperantodag er in geslaagd een buitengewoon belangrijk programma samen te stellen.

Met name wordt de aandacht gevestigd op den uitgetrokken tijd, beschikbaar voor het bezoek aan de tentoonstelling. Duidelijk blijkt, dat het niet de bedoeling is, met een vluchtigen blik even de hallen te doorloopen, doch integendeel gelegenheid te bieden om onder deskundige leiding veel schoons te doen genieten. Het bezoek aan de tentoonstelling kost voor deelnemers aan den Esperantodag slechts 25 cent.

De kaarten daarvoor moeten echter genomen worden bij den penningmeester der Tilburgsche R.K. Esperantistenvereeniging:

*Den Heer Th. van Riel, Bredasche weg 31, Tilburg.*

Ook de kaarten voor het gemeenschappelijk diner zijn aan bovengenoemd adres verkrijgbaar à f 1.50 per couvert. Deelnemers gelieven zich dus spoedig aan te melden en wel uiterlijk voor 1 Juli a. s. tegelijk met opzending per postwissel van het bedrag. Dringend zij hier aangespoord, om toch met aangifte niet te wachten tot het laatste oogenblik.

Bij het verwachte groote aantal deelnemers kan de commissie geenerlei verantwoordelijkheid op zich nemen, voor aangiften na 1 Juli. De tentoonstellingskaarten zijn ook op den dag zelve verkrijgbaar, doch men zal goed doen ze vooruit te nemen, ook om het zich zelf gemakkelijk te maken.

Zooals reeds vroeger was aangekondigd geeft het comité voor dezen Esperantodag een propagandaboekje uit, dat aan iederen bezoeker der tentoonstelling zal worden verschaft.

Voor de avondvergadering zullen nog afzonderlijke programma's worden gedrukt en op de tentoonstelling worden verspreid.

Op deze vergadering zullen korte toespraken gehouden worden door:

1. Den Heer P. Janssen Amsterdam.

Onderwerp: *Het Esperanto en de Katholieke Pers,* (in 't Nederlandsch)

2. Den Wel.Eerw. Zeer Gel. Heer Prof. H. Linnebank Uden.

Onderwerp: *La nunaj rezultatoj de la katolika movado,* (in Esperanto).

3. Mej H. van Griensven, 's-Hertogenbosch.

Onderwerp: „*Heeft het Esperanto de Toekomst?*" (in 't Nederlandsch)

Vervolgens zal ook een Belgische samideano een begroetingswoord in Esperanto uitspreken.

Voor niet-deelnemers aan het diner zij opgemerkt, dat de wandeling naar de tentoonstelling zal aanvangen op den Heuvel en wel om half drie (na afloop van het diner).

Wijl deze dag overigens weinig kosten met zich brengt, spreken wij

de hoop uit, dat ditmaal een groot getal deelnemers zich zal aanmelden voor den gemeenschappelijken maaltijd, (zie boven).

Bij aankomst der treinen, waarvan wij hiernevens nog een kleine tabel geven, zullen de bezoekers worden ontvangen door Tilburgsche gesamideanoj, die hen naar de kapel der Eerw. Fraters in de Gasthuisstraat zullen geleiden.

De commissie.

# SPOORWEGTABEL.

## Naar Tilburg.

| | vertrek | aankomst. |
|---|---|---|
| A'dam | 7,20 | 9,33 |
| Bergen op Zoom | 8,17 | 9,30 |
| Boxtel | 9,10 | 9,30 |
| Breda | 9,09 | 9,30 |
| | 9,19 | 9,38 |
| Eindhoven | 8,47 | 9,30 |
| Haag | 7,31 | 10,11 |
| 's Bosch | 8,42 | 9,13 |
| | 9,11 | 9,33 |
| Rotterdam D.P: | 8,07 | 9,30 |
| | 8,23 | 9,38 |
| Vechel | 8,19 | 9,30 |
| Venlo | 7,55 | 9,30 |

## Van Tilburg.

| vertrek | aankomst. |
|---|---|
| 8,16 | 10,30 |
| 8,35 | 11,44 |
| 10,13 | 12,32 |
| 8,29 | 9,51 |
| 11,43 | 12,11 |
| 9,22 | 9,43 |
| 10,26 | 10,49 |
| 12,16 | 12,42 |
| 7,57 | 8,56 |
| 11,43 | 12,43 |
| 9,22 | 11,22 |
| 8,35 | 9,15 |
| 10,13 | 10,35 |
| 9,22 | 10,49 |
| 10,26 | 12,13 |
| 7,59 | 8,50 |
| 7,59 | 10,06 |

## LEESKRINGEN.

De vierde jaarvergadering van Nederlanda Katoliko, wier aangename herinneringen zeker nog niet zijn vervlogen, droeg mij op, in ons orgaan een artikeltje te schrijven over het doel van de leeskringen, en de wijze waarop zij zouden kunnen ingericht worden. Gaarne volbreng ik die taak, omdat ik overtuigd ben van hun veelzijdig nut. Te weinig toch - de meesten zullen dit met mij eens zijn - wordt er Esperanto gelezen. Wie 'n cursus gevolgd heeft, zal daar in den regel wel op de hoogte gebracht zijn met hetgeen de Esperanto-litteratuur ons aanbiedt, doch de prijzen der boeken en tijdschriften schrikken steeds menigeen af,

## LEGRONDOJ.

La kvara jarkunveno de Nederlanda Katoliko, kies agrablaj memoraĵoj certe ne jam forflugis, al mi komisiis, skribi en nia organo artikoleton pri la celo de la legrondoj, kaj la maniero je kiu oni ilin povus aranĝi. Volonte mi plenumas tiun taskon, ĉar mi estas konvinka pri ilia multflanka utileco. Tro malmulte ja — plej multaj tion konsentos — oni legas Esperanton. Kiu sekvis kursaron, kutime tie estis sufiĉe instruita pri tio, kion al ni prezentas la Esperanta literaturo, sed la prezoj de la libroj kaj revuoj ĉiam multajn

ze zich aan te schaffen of er zich op te abonneeren.

Toch is dit jammer. De kennis onzer wereldtaal, op den cursus verworven, vervliegt zoo spoedig, als men niet voortdurend het geleerde blijft toepassen.

In den beginne slaat men aan het correspondeeren, doch slechts zelden treft men 'n samideano aan, met wien men zich ernstig over een onderwerp, dat beiden interesseert, kan bezig houden.

Dan komt er nog bij, dat 'n antwoord wat lang uitblijft, of men niet zoo spoedig den tijd kan vinden om 'n schrijven terug te sturen, en de ambitie verslapt.

De correspondentie wordt minder en daarmee de beoefening onzer taal.

Nu en dan komt N.K. ons nog eens wakker schudden, maar, daar de puntjes reeds van onze taalkennis beginnen af te slijten, laat men niet zelden den Esperanto-tekst ongelezen, en het laatste middel om het geheugen nog wat op te frisschen wijst men daardoor van de hand.

Onnoodig te zeggen, dat leden, die zoo zoetjesaan geheel hunne kennis van Esperanto voelen verdwijnen; daarmee ook al de geestdrift kwijt raken, die toch voor een krachtige actie noodig is.

't Is daarom, dat het zoo nuttig zou zijn, zoo ieder, die Esperanto geleerd heeft, aanstonds voldoende lectuur kon hebben om het geleerde in beoefening te brengen.

Lectuur van verschillende soort moet hem ten dienste staan: ontspanningslectuur, zoowel als wetenschappelijke, ontwikkelingslectuur evenzeer als vaklitteratuur.

Neem nu 'n onderwijzer. Die neemt 'n abonnement bijvoorbeeld op *Internacia Pedagogia Revuo, Espero Katolika* en *Esperanto.*

Deze abonnementen kosten hem jaarlijks 5 sm. of 6 gulden. Wil hij daarbij nog 'n paar boekwerken aanschaffen, dan kost hem Esperanto al gauw 10 gulden per jaar.

fortimigas ilin haviĝi aŭ aboni.

Tamen tio estas bedaŭrinde. La konado de nia mondlingvo, akirita dum la kursaro, tiom baldaŭ forflugas, se oni ne daŭre praktikadas la lernitaĵon.

Komence oni ekkorespondadas, sed nur malofte oni renkontas samideanon, kun kiu oni serioze povas okupiĝi pri temo, kiu ambaŭ ilin interesas.

Plue, respondo iam sin atendigas iom longtempe, aŭ oni ne tuj povas trovi la tempon por resendi skribaĵon, kaj, la emo ekforiĝas.

La korespondado malplioftiĝas kaj per tio la praktikado de nia lingvo.

De tempo al tempo N.K. venas nin ekveki, sed, ĉar la plej delikatajn aferojn de la lingvo ni jam forgesis, oni nemalofte nelegas la Esperanto-tekston, kaj tiel oni rifuzas la lastan rimedon por iom refreŝigi la memoron.

Nenecese diri, ke membroj, kiuj tiel iom post iom sentas sian Esperanto-konadon malaperi, per tio ankaŭ perdas ĉiun entuziasmon, kiu tamen estas necesa por fortika agado.

Tial estus tiom utile, ke ĉiu kiu lernis Esperanton, tuj povus havi sufiĉe da literaturo por praktiki la lernitaĵon.

Diversspeca legaĵo devas esti je lia dispono: distra legaĵo kiel faka. Supozu instruiston.

Li ekzemple abonas je *Internacia Pedagogia Revuo, Espero Katolika* kaj *Esperanto.*

Tiuj abonoj jare kostas al li 5 Sm. aŭ 6 guldenojn. Se li plue volas havigi al si kelkajn verkojn, tiam Esperanto baldaŭ kostos al li 10 guldenojn jare.

Dat kan Bruintje echter niet trekken. Let wel: ik spreek hier van den doorsnee-onderwijzer. Er zijn er die meer kunnen doen, doch de meesten kunnen zich zulke kosten niet veroorloven. En zoo geloof ik, dat het ook is met den doorsnee - esperantist. Hij kan zich niet die lectuur verschaffen, welke van hem een degelijk Esperantist moet maken.

Er moet dus 'n middel gevonden worden. Welnu dit middel vinden wij in de leeskringen. Wat één niet kan, dat kunnen meerderen te zamen, en waar de Bond hen steunt, hen aanmoedigt en voor den geregelden gang zorg draagt, daar kan het succes niet uitblijven.

Zeker; ook particulier initiatief kan iets tot stand brengen. Doch één van beiden moet gebeuren: óf het prikkelt tot navolging, óf niet. In het laatste geval is het nut zeer gering, het beperkt zich tot intiemen kring. In 't eerste geval zal hier de zaak goed marcheeren, dáár in 't honderd loopen, hier nut stichten, daar ontevredenheid verwekken en zoo misschien evenveel kwaad als goed veroorzaken.

Neen; van boven af: steun, aanmoediging en beheer.

En hoe?

Daarover een afzonderlijk artikeltje.

Tamen: tiom Brunulo ne povas treni, oni diras holandlingve; t.e. tion ne permesas la enspezoj. Atentu: mi tie-ĉi parolas pri mezeca instruisto. Ekzistas kiuj povas fari plimulte, sed la plej multo ne povas permesi al si tiajn elspezojn. Kaj tia mi kredas ankaŭ mezspecan Esperantiston. Li ne povas havigi al si tiun legaĵon, kiu igos lin bona Esperantisto.

Devas esti trovata rimedo. Nu: Tiun rimedon ni trovas en la legrondoj. Kion unu ne povas, tion plimultoj kune povos, kaj kiam la Ligo ilin apogas, ilin instigas, kaj prizorgas la regulan funkciadon, tiam la sukceso ne povas forresti.

Certe, ankaŭ persona iniciativo ion povas starigi. Sed unu el ambaŭ devas okazi: aŭ ĝi instigas al imitado, aŭ ne. En la lasta okazo la utilo estas tre malgranda, ĝi limiĝas je intima rondo. En la unua okazo tie-ĉi la afero bone marŝos, tie ruiniĝos, tie-ĉi faros utilon, jen vekos malkontentecon kaj eble tiel kaŭzos tiom da malbono kiom da bono.

Ne; desupre: apogo, instigo, kaj administrado.

Kaj kiel?

Pri tio aparta artikoleto.

P. A. S.

# IDEALO.

Senmakula,
Bluokula,
Blonda Knabinet;
Tre ĉarmanta,
Min amanta,
Dolĉa infanet.

Kun rideto
Sur buŝeto
Vi alvokas min;
Kaj mi venas,
Ĉar vi vokas,
Kaj mi amas vin.

Bluokula,
Senmakula,
Gardanĝel de mi,
Al ĉielo
Nia celo
Kune iros ni!

*Anjo.*

# OFICIALA PARTO.

**Ŝanĝoj en la anara listo ĝis la 15a de Majo 1913a.**

UNUIĜOJ.

*La Eĥo de la Kuijklando*

Novaj membroj:

S-ro H. Donker, Gennep.
S-ro C. R. Steinmann Gennep.
F-ino L. Steinmann „
D. Schmidt

*'s-Gravenhage.*

Nova membro:

S-ro Nic. van Calsteren, Gedempte sloot 50.

Adresŝanĝo:

F-ino M. Toonen al *Rotterdam*, Mauritsweg 18.

FAVORANTOJ.

Novaj:

S-ro G Hoogeveen N. Gracht 80 Haarlem.

S-ro P-o Th. van Outerterp, kapelaan, *Hoofddorp*.

Adresŝanĝo:

S-ro M. Horikx, Kooilaan 25, Leiden.

PETO!! Ni petas insiste al la Sekretarioj (inoj) de la unuiĝoj, ĉiam sendi la ŝanĝojn en la anara listo antaŭ la 15a de ĉiu monato al la ĉefsekretario de Nederlanda Katoliko, S-ro H. B. van Zwet, Leeuwstraat 3bis Utrecht.

Saman peton al la favorantoj pri adresŝanĝoj.

Plendojn, pri la neregula ricevo de nia organo „Nederlanda Katoliko" al la sama adreso.

---

*Ons Propaganda-sluitzegel is verkrijgbaar aan het Secretariaat van den Bond Leeuwstraat 3bis Utrecht.*

*Wordt in iedere hoeveelheid geleverd.*
*Prijs: 5 stuks voor 1 cent.*
*Bij afname van minstens 250 stuks tegen inkoopsprijs (10 st. voor 1 cnt.)*
*Bestellingen niet vergezeld van geld worden niet uitgevoerd.*

---

## Com. voor de Bibliotheek.

De Weleerw. Hooggel. heer Dr. Titus Brandsma, uit het Karmelietenklooster te Oss heeft zich welwillend bereid verklaard als recensent op te treden.

Hiermede is in een groote behoefte voorzien en wij danken Z. H.Eerw. voor de welwillendheid, door hem betoond.

Namens het Dag. Bestuur.
H. B. VAN ZWET, 1e Secr.

# ENLANDA KRONIKO.

### Unua Nederlanda Kongreso Esperantista.

La Kongresa Komitato instigas ĉiujn gesamideanojn partopreni la U.N.K.E (Hago, 26-28 Julio 1913) kiu montros al ili plej belan parton de Holando, kaj aliĝi kiel eble plej baldaŭ.

Programoj kun aliĝiloj senpage mendeblaj ĉe S-ro J. R. G. Isbrücker, Riouwstraat 169, Hago, Holando.

**Hago.** La 29an de Majo 1913 okazis ĝenerala kunveno de H.K.E.V.

Oni decidis ne okazigi la konversaciajn kunvenojn dum Junio, Julio, Aŭgusto kaj Septembro.

La sekretario raportis pri la jarkunveno de N.K. en 's-Hertogenbosch kaj pri la movado enlanda kaj eksterlanda; kaj fine priparolis la Moerkerk-kartojn.

Grupano paroladis pri 's Francisko Assissi'a, post la parolado oni petis

la Dian benon por la Ekektoj Parlamentaj.

La Kunsido komencita per la Himno Katolika, finis per la „Ave Maria".

Sekr. H.K.E.V. H. F. Pothast.

## Examen-Uitslag.

De in ons vorig nummer verschenen lijst behoeft eenige verbetering.

Onder de geslaagden voor diploma A leze men Mej. G. M. Kruisbrink inplaats van Kruisfrink.

Tot de geslaagden voor diplima B behoort de Eerw. Zuster Wilhelma, niet Wilhelmina.

## Pilgrimado kaj Kongreso de Romo.

Tiuj katolikaj gesamideanoj, kiuj intencas viziti la Roman Katolikan Kongreson, „*Nia Kvara*" bonvolu konigi sian opinion al la ĉefsekretario de „Nederlanda Katolika", Leeuwstraat 3bis Utrecht. Se eble estos organizata karavaneto.

## Dua Regiona Esperanto Tago. Tilburg - 6 Julio.

Dum Pentekosto okazis en Eastbourne la Sesa Brita Esperanto Kongreso. Niaj transmaraj amikoj multe propagandis ĝin ĉie, kaj i.a. aperis en la Maja kajero de „The British Esperantist" lasthora invito, partopreni en ĉi tiu kongreso. Pro tio, ke la multdirantaj linioj de nia samideano Ŝejŝkpir aukaŭ por nia celo bone estas aplikeblaj, ni ĉi-sube presigas ilin (nur ŝanĝinte la vorton Eastbourne en Tilburg), esperante ke ili havu bonan efikon:

*Konsilo Sekvinda.*

Al *Tilburg* ni nepre veturu!
Ni flugu, aŭ marŝu, aŭ kuru!
Sed iru ni certe,
Parolu ni lerte,
Kaj tuj, ke ni iros, ni ĵuru!

*H.* *Niĉjo.*

---

# Esperanto Examens - Voorjaar 1913.
## 1 Mei 1913 - Rotterdam.

### Examen B.

*Maak een opstel (in het Esperanto) over een der volgende onderwerpen:*

1. Een begrafenis.
2. In den trein.
3. Brand.
4. In den dierentuin.
5. IJsvermaak.
6. Mijn beroep of ambacht.
7. De Gelaarsde Kat.
8. St. Nicolaasavond.

*Traduku:*

Estis je la 24a de Maja de l' jaro 1598a, ke la fama Filipo van Marniks, Sinjoro de Sankta Aldegondo edzinigis unu et siaj filinoj al la Barono Van Asperen. La alta estimo, kiun ĝuis ĉe la kortego la patro de l' fianĉino, la plenmeritita famo, kiun havigis al li liaj bonegaj faroj tiel en tempo de paco kiel de milito, la kora sindonemo kaj la senafekta estimo montrataj al li ne nur de la ĉefo de l' registaro (landestraro), sed ankaŭ de la pli malaltaj klasoj, estis altigintaj la ceremonion je festado preskaŭ tutnacia.

Homoj de ĉiu rango, klaso kaj profesio amase iris Lejdenon, kie en la Valona preĝejo estis okazonta la beno al la gefianĉoj; oni krome (krom tio) ĝojis pro la espero vidi la ceremonion plibriligata de la ĉeesto de grafo Maŭriko, kiu laŭdire jam pro-

mesis al Sinjoro Van Aldegonde ĉeesti kun sia tuta korteganaro la feston edziĝan.

Granda estis la amaso de tiuj kiuj, nur pro scivolemo kaj ne ankoraŭ sciante kiel tiu plejbone estis kontentigota, estis allogataj al la urbo Akademia; multnombraj estis ankaŭ la intence invititaj, por kies plaĉo oni estis havinta sufiĉan zorgon por oportunaj lokoj en la preĝejo, kaj estis seniginta je floroj ĉiujn ĝardenojn, kiujn oni jam komencis aranĝadi ĉirkaŭ Lejdeno.

*Vertaal in Esperanto:*

1. Ik zal hem aanklagen wegens beleediging, tenzij hij mij vergeving vraagt.
2. Gedurende zes achtereenvolgende uren regende het onophoudelijk.
3. Lees door, inplaats van te redeneeren over dingen, die ge toch niet begrijpt.
4. Beide beklaagden waren reeds twee malen gestraft.
5. Verzwakt door bloedverlies, kwamen de soldaten ellendig om op het slagveld.
6. Onze Schotsche vrienden, ons met hun schoone stad bekend willende maken, gaven een gidsje door Edinburg uit, dat allerbelangrijkste mededeelingen over haar geschiedenis bevat.
7. Verlangt u de eieren gekookt of rauw?
8. Nog tot voor weinige jaren beweerden vele menschen dat de specerijen moeilijk verteerbaar zijn en schadelijk voor het bloed.
9. Als gij boos wordt, zult ge het nooit met elkander eens worden.
10. Hij heeft het raadsel niet opgelost, maar hij probeerde het tenminste.
11. Halvemaansgewijze. langs den tegenovergestelden oever der rivier, lag tusschen tuinen en vestingwerken van allerlei vorm de breede rij van paleizen en moskeeën, die Agra tot een der schoonste steden van de wereld maakten.
12. De visscher was op het punt een visch te vangen maar het touw brak en de visch viel weer in het water.
13. Hij, die gezond is, kan tevreden zijn. Wat gij gezegd hebt, kan niet waar zijn. Wat ik u gegeven heb, moet gij bewaren. Wat hebt ge daar? Geef dien hond wat water: het arme dier heeft dorst.
14. De leerling zeide tot zijn onderwijzer, dat zijn huiswerk af was, waarop de onderwijzer antwoordde: dat is goed, mijn jongen, leg het in de lade van mijn tafel en ga wat spelen.
15. Volgens het spoorboekje komt de trein 10 minuten over 8 aan, nu is het al 10 minuten over half negen: hij is dus al een half uur te laat.

---

## Examen A.

*Vertaal:*

1. Weest uwen Ouders gehoorzaam.
2. Als ik rijk was, zou ik vele vrienden hebben.
3. Aan wiens boek geeft gij de voorkeur?
4. Breng mij zulken inkt als ik altijd gebruik.
5. Hoeveel het paard ook kost en aan wien het ook toebehoort, ik zal het zeker koopen.
6. Zijn zwager is een jaar en twee maanden in Frankrijk geweest.
7. Waarom komt de geroepene niet terstond?
8. Hoe hebben mijne leerlingen zich gedragen gedurende mijn afwezigheid?
9. Door den hevigen regen doofden de vuren uit.
10. Hang hunne mantels achter het gordijn.
11. Dat heb ik nooit en nergens gezien.

12. Dat gebeurde tusschen vijven en zessen namiddags.

13. Wij vertrekken overmorgen naar het buitenland.

14. Hij twijfelt niet meer aan hun vijandschap.

15. Hare Majesteit de Koningin is geliefd door hare onderdanen.

16. In koffiehuizen gebruikt men dikwijls tafels van marmer.

17. Drie honderd acht en veertig duizend zes honderd en tien.

18. Wie is daar? Ik ben het. Wat doet gij? Wat werkt gij vlug!

19. Alle boeken van dat meisje zijn prachtig gebonden.

20. De onderwijzer gaf zijn leerling veel huiswerk. De leerling maakte het, bracht het bij zijn onderwijzer en deze zag zijn huiswerk na.

*Diktaĵo.*

*Rakonto de la luno.*

Estis hieraŭ en la matena krepusko — tio estas la propraj vortoj de la luno. Ne unu kamentubo fumis ankoraŭ en la granda urbo, kaj estis precize la kamentuboj al kiuj mi rigardis. El unu inter ili elvenis nun kapeto kaj poste venis la duona korpo, la brakoj ripozis sur la rando de la kamentubo, „Hura!"

Estis malgranda kamentubista lernanto, kiu la unuan fojon dum sia vivo estis veninte tute supren en kamentubo, kaj li estis elŝovinta la kapon. „Hura!" li kriis laŭtvoĉe.

Jes, tio estis io alia ol ĉirkaŭrampi en la malvasta tubo kaj en la mallarĝaj kamenoj! La aero blovis tiel freŝe, li povis rigardi super la tuta urbo ĝis la verda arbaro. La suno ĵus leviĝis; ronde kaj grande ĝi lumis al li en la vizaĝon, kiu brilis pro feliĉego, kvankam ĝi estis tute ŝmirita per fulgo. „Nun la tuta urbo povas vidi min!" li diris „kaj la luno povas vidi min kaj ankaŭ la suno! Hura!"

Kaj dirante tion li svingis la balailon.

# Kroniko de I.K.U.E.

## Internacia Pilgrimo Katolika kaj kvara internacia Kongreso de la Katolikoj Esperantistaj en Romo (4-10 de Septembro 1913).

*Letero-Cirkulero de Sinjoro Cl. Colas,*
Sekretario de niaj kongresoj,
al ĉiuj Katolikoj Esperantistaj, saluton en Kristo!

Mi ĵus revenis de Romo, kien, laŭ mia promeso, mi iris, delegite de la Preparanta-Komitato, por studi la organizadon de nia okazonta Pilgrimo-kongreso.

Antaŭ ĉio, mia devo estis klarigi precize al la plej altaj aŭtoritatoj en la Eterna Urbo la celon de nia katolika Esperantista movado kaj de la projektita pilgrimo.

Mi havis la honoron esti afable akceptita de Iliaj Eminentaj Moŝtoj la Kardinaloj Van Rossum kaj Vivès y Tuto, kiuj tre simpatie akceptis miajn klarigojn, kaj faris diversajn demandojn rilate al nia movado.

Dank al la helpado de L. E. Kardinalo Van Rossum mi havis la grandegan honoron obteni *privatan* aŭdiencon de Nia Sankta Patro Pio X. Tiu aŭdienco, konsentita al mi *kiel delegito*, kaj riprezentanto de nia *Katolika Esperantista Unuiĝo* estis fiksita por la sabato 8-a de Marto, je la horo 10.30. La malsaniĝo de Lia Papa Moŝto, kiu komencis tiun saman tagon, malebligis, ho ve! ke ĝi okazu, kaj mi devis, kun dolora bedaŭro, forlasi la Sanktan Urbon, ne prezentinte al nia komuna Patro la esprimon de fidela submetiĝo de la katolikoj Esperantistaj.

Krom la nomitaj kardinaloj, mi vizitis ankoraŭ multajn superulojn de Religiaj Ordenoj, influemajn pastrojn kaj Monsinjorojn (inter kiuj nian karan kaj ĉiam fidelan samideanon Mons.

Giambene), katolikajn ĵurnalistojn, k.t.p. Ĉiuj, sen escepto kun granda simpatio aŭdis pri nia movado.

Mi zorgis pri la materiala aranĝo de nia pilgrimo, kaj, atendante la aperon de la cirkulero, kiu tre detale konigas tion, mi jam povas liveri kiel certaj la jenajn punktojn, aprobitajn de nia kara Prezidanto.

1-e. La *pilgrimo proprenomita* komencos en Romo *la 4-an de Septembro kaj daŭros ĝis la 10-a*, do **ses tagojn** en Romo, laŭ la kutimo de ĉiuj pilgrimoj. (Oni rimarku ke estos 3 tagoj inter la ĝenerala kongreso en Bern kaj la komenco de la nia).

2-e. La aŭdienco de la Sankta Patro okazos verŝajne ĉu la Mardon, ĉu la Vendredon.

3-e. Ĉiuj kongresanoj *loĝos kaj manĝos kune*, kaj kune vizitos la urbon sub konduko de gvidistoj.

4-e. La vizito de Romo okazos grandparte *veturile*, laŭ la kutimo de la pilgrimoj.

5-e. La prezo de la tuta ĉeestado en Romo (ses tagoj) kun dormado, manĝado, vizitado, veturiloj, eniroj en muzeojn, gvidistoj, trinkmono, k.t.p. estos 28 Sm. (70 frankojn) por la komuna klaso, kaj 31 Sm. por unua klaso.

6-e. Rabato da 50 pCt. sur italaj fervojoj estos konsentita. (La franca kompanio P. L. M. konsentas 40 pCt.)

Mi povas nepre certigi, ke tiu *grava paŝo* estos plena kaj bela sukceso.

Aliĝu do ĉiuj niaj samideanoj. Romo! Kiu nomo povus pli forte batigi niajn korojn, altiri niajn animojn de katolikoj? La spaco uzebla en ĉi-tiu numero ne permesas, ke mi parolu pri la internaj ĝojoj, kiujn mi ĝuis dum la benitaj tagoj de mia trapaso en Romo, kaj la neforgeseblaj impresoj, kiujn mi alportis de la Eterna Urbo. Mi alifoje tion priparolos; sed kredu min niaj samreligianoj: La partopreno en nia pilgrimo alportos al ili centfoje pli da feliĉo, ol la plej sukcesplena ordinara Esperantista kongreso.

Oni *de nun* (por la klopodoj farotaj rapideco estas absolute necesa), sendu la aliĝojn al F-ino Larroche, 11 rue de Vaugirard, Paris.

Kun tutkora samideana saluto.

*Cl. Colas.*

*(El „Espero Katolika")*

---

# NAŬA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

## BERN, 24—31 Aŭgusto 1913.

La organiza laboro de la Naŭa nun tre bone marŝas, kaj la aliĝoj iom post iom alvenas, sed tamen estas necese, ke la Esperantistoj, kiuj intencas partopreni en la kongreso, aliĝu ĉiuj kiel eble plej baldaŭ. Oni pripensu, ke por multaj organizotaj aferoj, por la kongreslibro, la diversaj festoj kaj amuzaĵoj, la Loka Komitato devas scii la proksimuman nombron de la kongresanoj, kaj ĉar la tempo por la organizado de la Naŭa estas nur duone tiel longa ol la tempo por la aliaj kongresoj. Pro tio ni ankoraŭ unu fojon petas, ke oni ne prokrastu la aliĝon kaj alsendon de la mono por la kongresa karto (6 Sm = 15 Frankoj). Se oni ne ankoraŭ klare scias, ĉu oni loĝos en privata ĉambro aŭ en hotelo, oni ja povos sendi la monon por la loĝado pli malfrue, sed ni petas ne mendu ĉambron post fino de Junio; post tiu dato, la komitato ne plu povos akcepti respondecon por bona loĝejo.

Nia kara Majstro D-ro L. L. Zamenhof ĵus sciigas nin, ke li ĉeestos la kongreson kun la *tuta familio*, edzino kaj tri gefiloj. Estas do devo de ĉiuj Esperantistoj honori la Maj-

stron per sia ĉeesto kaj tiamaniere ankaŭ helpi al la bonsukceso de la Naŭa.

La Organiza Komitato estas feliĉa povi certigi nun la Esperantistaron, ke ni en Berno havos tre verŝajne la plej belan Kongresejon el ĉiuj ĝisnunaj kongresoj, ĉar ni sukcesis lui la novan Kazinon por ĉiuj niaj festoj kaj kunvenoj, krom la fakaj kunsidoj, kiuj okazos en la nova Universitato. La granda halo en la Kazino enhavas sidlokojn por 1500 personoj, en ĝi estas granda, tute nova orgeno, kiun ludos plej fama muzikisto Carl Locher, mondfama orgenludisto. En la sama halo okazos la diversaj vesperaj festoj: koncertoj, balo k. t. p. La Kazino, estas tute nova domego en aparte bela stilo, ĝi sidas apud la bordo de la rivero Aare, meze en la urbo kaj ĉe la fino de la mirinde bela ponto al la Kirchenfeld, plej nobla kvartalo de Bern; antaŭ la Kazino estas granda teraso, ombrumita de kaŝtanarboj kaj de sur tiu teraso oni ĝuas aspekton de la tuta Alpara ĉeno. En la sama domo troviĝas, je nia dispono kelkaj pli-mapli grandaj salonoj por la laboraj kunsidoj kaj la kunsidoj de UEA. En la teretaĝo kaj sur la teraso oni povas trinki kaj ĉiun tagon ĝuos unuarangan koncerton senpage.

Por la organizado de la diversaj ekskursoj kaj vojaĝoj dum kaj post la kongreso ni faris kontrakton kun bona vojaĝfirmo en Zürich, kiu nun preparas la planojn de diversaj vojaĝoj. En nia venonta cirkulero ni verŝajne povos detale raporti pri tiu flanko de la kongreso.

La Organiza komitato ankaŭ komencis starigi Honoran Komitaton, al kiu jam aliĝis multaj eminentuloj en Bern.

Ĉar por la organizado de la Naŭa, kiel ni jam diris, ni havas nur kelkajn monatojn, ni insiste petas ĉiujn *Esperantistajn Gazetojn* kaj ĉiujn Delegitojn de UEA, ke ili diskonigu per ĉiu forto la enhavon de niaj cirkuleroj, kiujn ni bedaŭrinde pro manko de tempo ne povas sendi al ĉiuj aparte.

Fine ni petas pardonon al tiuj personoj, kiuj jam mendis poŝtkartojn kaj glumarkojn sed ilin ne recevis ĝis nun. Ĉar ni mem, pro fatala malhelpo recevis la sigelmarkojn nur nun, ni prokrastis ankaŭ la sendadon de la kartoj por eviti duoblan koston. Sed nun la regula dissendado komencis, kaj baldaŭ ĉiuj estos kontentigitaj. Ni samtempe rememorigas, ke ni eldonis du belegajn poŝtkartojn (po 10 cts. = 4 sd) kaj ankaŭ same belan sigelmarkon (100 ekzempl. = 40 sd.)

Laŭ interkonsento kun la Pensionoj kaj Privatuloj de la Kongresurbo, la Organiza Komitato sukcesis atingi sufiĉe pli malaltajn prezojn por la ĉambroj kaj manĝoj. Ĉar ni tion sciiĝas nur en lasta minuto, ni detale raportos nur en la venonta numero de la Oficiala Gazeto de la Kongreso.

### Grava Sciigo

La kongreslibro estas nun en presado kaj aperos en la komenco de Julio. Ĝi estos tre interesa pro multaj vere bonaj informoj. Krom la diversaj artikoloj ĝi enhavos la liston de la kongresanoj, kiuj pagis sian kotizon ĝis la 30a de Junio. Kiu do deziras esti en tiu listo, sendu sian aliĝon antaŭ la nomita dato.

Kelkaj Esperantistoj ŝajnas timi, ke la ĉambroj de kvara klaso ne estas bonaj, ĉar la plejmulto mendas nur ĉambrojn de la tri unuaj klasoj.

La Organiza Komitato havas la plezuron povi konstati, ke ankaŭ la ĉambroj de la tria kaj kvara klasoj estas tre puraj kaj kontentigaj. Ni vizitis ĉiujn ĉambrojn kaj povas certigi, ke personoj ne tro postulemaj loĝos tre oportune en la ĉambroj de la tria kaj kvara klasoj.

Plie ni atentigas pri la plezuriga fakto, ke la prezoj de la loĝado kaj manĝado estos pli malkaraj ol ni

sciigis antaŭe. Sekve de interkonsento kun la forluantoj ni notas tie - ĉi la novajn prezojn:

Prezo por unu ĉambro kun unu lito:

| | Kun matenmanĝo, Sm. | Kun tri manĝoj Sm. |
|---|---|---|
| 1e kl. maksimume | 18 | 25 |
| 2e „ | 14 | 20 |
| 3e „ „ | 12 | 15 |
| 4e „ „ | 8.50 | 11 |

Oni konstatos, ke ĉambroj kun tri manĝoj estas relative tre malkaraj. Por ĉambroj kun du litoj la prezo estas ordinare la sama ol por du ĉambroj; kelkaj posedantoj donas en tiu kazo malgrandan rabaton.

---

La tempo rapidas! Nur tri monatojn ankoraŭ kaj nia granda festo komenciĝos. Grava kaj peza estas la laboro de la Organiza Komitato, kaj la kongresanoj plejeble komplikigas tiun laboron prokrastante sian aliĝon ĝis la lasta momento. Ĉiumonate ni sendas oficialajn cirkulerojn al ĉiuj Esperantaj gazetoj, sed ni ne scias, ĉu ili presigas ilin aŭ ne, ĉar oni bedaŭrinde ne alsendas la koncernajn numerojn. Ni do insiste petas la administraciojn de ĉiuj gazetoj, ke ili bonvole havigu al la O.K. tiajn atestilojn.

En nia lasta kunsido ni starigis la programon de la kongreso. Laŭ tiu programo la solena malferma kunsido de la Naŭa okazos la 24-an de Aŭgusto (dimanĉo) je la tria posttagmeze; la solena malferma kunsido de UEA lundon 25-an de Aŭgusto posttagmeze. Ĉiutage, escepte merkrede, okazos la laboraj kunsidoj de la Naŭa kaj de UEA. La solena ferma kunsido de la Naŭa okazos sabaton posttagmeze. Ĉiumatene inter la 8-a kaj la 10-a kaj ĉiuvespere post la 5-a kunvenados la diversaj fakaj societoj. La komitatoj de ĉi tiuj societoj bonvolu senprokraste komuniki al ni kiom da kunsidoj ili deziras, por ke ni povu starigi horaron.

La 24-an de Aŭgusto estos diservoj en protestanta, katolika kaj hebrea preĝejoj. Merkrede estos aranĝata belega tuttaga ekskurso al Berna Alparo. La kongresanoj troviĝos meze de la neĝa montaro kaj ĝuados nekompareblan pejzaĝon. La internacia balo, en mirinde bela salonego de la Nova Kazino okazos ĵaŭdon vespere. Ne forgesu alporti viajn naciajn kostumojn!

Kiel teatraĵon oni ludos la originalan svisan dramon „La Patreco", verkitan de samideanino M. Wolf en Chaux-de-Fonds.

Plej bela festo de la tuta kongreso kunvenigos la Esperantistaron la 31-an de Aŭgusto sur Gurten, monto 860 metrojn alta proksime de Bern, kun elektra fervojo: Matene prezentado de la Ruĝa Kruco, festeno en ombra parko. Posttagmeze granda svispopulara festo kun „jodlada" koncerto, luktado k.t.p.

Ĉiuvespere dum la kongresa semajno estos belaj koncertoj, paroladoj, promenadoj ĉirkaŭ la urbo, boatveturoj sur Aare k.t.p.

La Kongresa Libro estos tre riĉenhava kaj servos kiel taŭga kaj fidinda gvidlibro. En ĝi oni trovos la liston de ĉiuj kongresanoj, kiuj pagis sian kotizon antaŭ la fino de junio. Kiu do volas esti en tiu listo ne plu prokrastu la aliĝon. La kongresa karto kostas 6 Spesmilojn (15 frankojn), la help-kongresa karto 3 Sm. La oficialaj poŝtkartoj estas tre volonte aĉetataj (10 centimoj po peco) kaj la unua provizo da sigelmarkoj baldaŭ estos elĉerpita (100 pecoj = 0,40 Sm.)

Esperantistoj, sendante vian aliĝon, ne forgesu la adresojn de nia Komitato: Mono estu sendata al „Kantonalbank en Bern", kaj ĉia korespondaĵo al la Universala Kongreso de Esperanto en Berno.

Berno, en Majo 1913.

La Direktanta Komitato.

# *Lernludo Esperanta.*

*Bonega ilo por komenculoj kaj progresuloj, por bone lerni nian karan lingvon. Sendu senprokraste poŝtmandaton aŭ ĉekon de Sm. 1,— (f 1,20) al „Eldonejo Esperantista"*

*ADR. J. VAN DAM,*

*Kanaalstraat 38. - Amsterdam.*

*Nederlando.*

---

# TILBURG

INTERNATIONALE TENTOONSTELLING

# ESPERANTO-DAG

## ZONDAG 6 JULI 1913.

---

**Bezoek den stand der Tilburgsche R.K. Esperantisten-vereeniging in het Onderwijs-Paviljoen.**

---

**Machinale Fabriek van Houtbewerking**
**„DE MARK"**

# Jac. van Groenendael, Breda

**Alle Timmerwerken, Speciaal in Eikenhout**

**KERKBANKEN - KERKSTOELEN**
**SCHOOLMEUBELS, enz.**


---

Stoomdrukkerij P. J. STRIJBOS HUIJBERS, Eindhoven.